001 Kiu mi estas?





k = litero (konsonanto) **t** = litero (konsonanto)	**a** = litero (vokalo) **o** = litero (vokalo)	**ka** = silabo **to** = silabo	kato = vorto	= bildo

Ligu la bildojn kaj la vortojn!

Nomu la objektojn kaj bestojn. Ligu ilin kun la lokoj kaj la homoj:



LOKOJ:

1. bakejo
2. farmbieno
3. komputilejo
4. kudrejo
5. lernejo
6. ŝipo
7. teatro
8. sekretejo

HOMOJ:

A: aktoro
B: bakisto
C: instruisto
Ĉ: farmisto
D: komputisto
E: spiono
F: tajloro
G: maristo

Loku la vortojn!

Kio estas bakisto? Bakisto estas homo. Kio estas pano? Pano ne estas homo. Pano estas objekto. Pano ne estas maŝino. Komputilo estas objekto (kaj maŝino!). Kio estas mevo? Mevo estas besto. Kio estas teatro? Teatro estas loko. Kio estas muso? En bakejo, ĝi estas besto, en komputilejo, ĝi estas objekto.

Loku la vortojn en la ĝustaj kolumnoj: aktoro, bakejo, bakisto, bovino, ekrano, farmisto, flago, forno, hundo, instruisto, jako, jupo, komputilo, kudrejo, lampo, lernanto, lernejo, masto, mevo, muso, pano, pantalono, podio, porko, porkejo, printilo, robo, skanilo, skarabo, spiono, ŝafo, ŝtofo, tabulo, tajloro, teatro, telefono.

OBEJKTOJ (MAŜINOJ)	OBEJKTOJ (NE-MAŜINOJ)	LOKOJ	BESTOJ	HOMOJ

Ordigu la vortojn!

Jen vortoj el la umo. Sed la literoj estas en malbona ordo – fakte ili estas en alfabeta ordo. Ordigu ilin:

ajko, dioop, amost, fooŝt, aeknor, afglo, dhnou, almop, binoov, iklmooptu, aiklnos, ablotu, aeortt, aimorst.

Miksu vortojn mem el la umoj kaj testu unu la alian!

002 Kiu mi estas?



Kio estas demando?

La aktoro eraras.

Hamleto ne diras:
"Ĉu esti aŭ ne esti?
Jen la respondo!"

Hamleto diras:
"Ĉu esti aŭ ne esti?
Jen la demando!"

2 + 2 = **?**	Tio estas demando.
?	Tio estas demando-signo.
2+2 = **4**	"**4**" (kvar) estas respondo; vera, bona, prava respondo.
2+2 = **5**	"**5**" (kvin) estas respondo; malvera, malbona, malprava, erara kaj falsa respondo.

"Kiu vi estas?"	Tio estas demando.
"Mi estas 005."	Tio estas respondo; vera respondo.
"Kio vi estas?"	Tio estas demando.
"Mi estas spiono."	Tio estas respondo; vera sed stulta respondo – tio estas sekreto.

Demando-tabelo

Por demando estas respondo. Kiu?

	Demando		Respondo
1	Kio estas por tajloro?	A	Mar-birdo.
2	Kio estas gastronomo?	B	Aktoro (fama).
3	En kio estas tabulo?	C	Rolando Jenon.
4	Kio estas por Trevoro?	Ĉ	Farmisto Rik Oltelsek.
5	En Romo, kiu estas 005?	D	Trevoro Sabund.
6	Kio estas en la komputilo?	E	Hundo kaj ŝafo kaj porko...
7	Kiu estas en Sidneo?	F	Sonja Tralini.
8	Kio estas mevo?	G	Pano.
9	En Parizo estas kio?	Ĝ	Persono kiu manĝas kaj ☺.
10	Kio estas por farmisto?	H	Navigisto (malbona).
11	En forno estas kio?	Ĥ	Granda vesper-manĝo.
12	Kiu estas gastronomo?	I	Marcel Tertraf.
13	En Romo, kio estas 005?	J	Ŝtofo kaj kudrilo.
14	Kiu ne estas en Monako?	Ĵ	Skarabo (program-eraro).
15	Marcel estas kio en ŝipo?	K	Mateno kaj maten-manĝo.
16	Kiu estas 005 kun falsa peruko?	L	Lernejo.

Davido demandas. 005 respondas.

Rol-ludu kaj demandu:

Grupanoj elektu esperantajn nomojn kaj profesiojn. Elektu el tiuj en umo 001; via gvidanto proponos aliajn. Elektu urbon en kiu vi estas.

Desegnu (✎), eltondu (✂) kaj nomu kvin objektojn aŭ bestojn – ili rilatu al via profesio.

Ĉiu prezentu sin: diru la nomon, profesion, urbon. Montru kaj prezentu la objektojn kaj bestojn. Diru, ekzemple: Mi estas piloto. Tio estas ĉapo, tio estas jako, tio estas kompaso, tio estas aviadilo kaj tio estas flug-plano.

Poste demandu unu al la alia, ekzemple: Kiu vi estas? Kio vi estas? En kiu urbo vi estas? Kio estas tio? (pri objektoj) Por kiu estas la flago? Kaj tiel plu... (ktp)...

Al la demando: "Kio estas la partnero de demando?", "Respondo" estas la respondo

003 Mi sportas



Mi saltas!

Mi grimpas

Mi falas

Mi gimnastikas

Mi plonĝas

Mi naĝas

Mi tenis-ludas!

Mi futbal-ludas

Fine, mi dormas

Kiu sportas kie?

005 iras ok lokoj. Li sportas en ok lokoj. Sed la nomoj? Ok nomoj — sekretaj.

Kiu	Kion faras	Kie
Gustavo	grimpas	en Gabono.
Sonja	saltas	en Singapuro.
Normano	naĝas	en Najrobo.
Alano	akrobatas	en Adelajdo.
Petro	plonĝas	en Parizo.
Barto	basbal-ludas	en Bostono.
Rodrigo	rul-sketas	en Rio.
Doroteo	dormas	en Damasko.



Estas sportoj por unu homo, estas sportoj por du personoj. Denove 005 iras ok lokoj. Li sportas en ok lokoj. Denove, li uzas sekretajn nomojn.

Kiu	Kion faras	Kie	Kun kiu
Petro	paf-arkas	en Pekino	kun Li.
Keneto	kuras	en Katmanduo	kun Kunio.
Tomaso	tenis-ludas	en Toronto	kun Tereza.
Ŝila	ŝak-ludas	en Moskvo	kun Perla.
Bruto	boksas	en Bordozo	kun Bruno.
Sonja	saltas	en Sidneo	kun Rik.
Roĝero	remas	en Oksfordo	kun Niĝelo.
Dora	dancas	en Dareselamo	kun Sentak.

Por spiono estas sekreta frazo

Elektu el la unua, plej supra tabelo unu sekretan kvar-vortan frazon. Elektu la vortojn el malsamaj kolumnoj. Ekzemple: Gustavo tenis-ludas en Najrobo. Unu lernanto estu spiono. La spiono havu sekretan premion. La gvidanto kaj la spiono skribu la sekretan frazon. Lernantoj venu unu post unu kaj diru frazon. La spiono raportas al ĉiu la sukceson de la diro:

- *Malbona. Neniu vorto estas bona.*
- *Boneta. Unu vorto estas bona.*
- *Bona. Du vortoj estas bonaj.*
- *Bonega. Tri vortoj estas bonaj.*
- *Bonega, perfekta! La frazo estas bona. Vi gajnas. Jen via premio.*

Lernantoj diras frazojn ĝis unu diras la frazon bone. Poste, ludu per ses-vortaj frazoj, tiuj el la dua tabelo. Pli poste, konstruu viajn proprajn tabelojn!

Vera aŭ malvera?

1. Barto basbalas en Bostono.
2. Roĝero rul-sketas en Rio.
3. Dora dancas en Damasko.
4. Normano naĝas en Najrobo.
5. Petro aktoras en Romo.
6. Petro estas farmisto en Aŭstralio.
7. Sonja saltas en Singapuro kun Rik.
8. Tomaso tennis-ludas en Tokio.
9. Ŝila ŝakludas kun Perla.
10. Roĝero remas en Kembriĝo.
11. Porko estas por aktoro.
12. Ŝipo estas por maristo.
13. Kodlibro estas por spiono.
14. Tondilo estas por komputisto.
15. Verda stelo estas por 005.

004 Luko kaj Lunjo

Venas Luko. Li venas. Venas Lunjo. Ŝi venas.

005 salutas lin. 005 salutas ŝin.

005 frapas la sakon. Li frapas ĝin

Ago = frapas
Aganto = 005
Suferanto = sako.

Ni markas la suferanton!

Do,
Li frapas la sakon







Ligu la fraz-partojn. Kiu faras kion? (Maldekstre estas subjektoj, dekstre verboj kaj objektoj, kun -N).

La bakisto...	skribas programon.	tondas ŝtofon.
La instruisto...	tenas kranion.	levas kurtenon
La lernanto...	melkas bovinon.	hisas flagon.
La aktoro...	bakas panon.	ĉasas skarabon.
La teknikisto...	uzas muson.	ludas tenison.
La farmisto...	ĉasas muson.	kudras ŝtofon.
La tajloro...	lernas matematikon.	movas lampon.
La komputisto...	uzas fornon.	havas skanilon.
La maristo...	forgesas tekston.	tondas la lanon de ŝafo.
La sportisto...		

005 Jen mia paĝo!

PASPORTO

La stato de SEKRETO insistas ke vi donu liberan trairon kaj senpagajn trinkaĵojn al nia fidela sed sekreta spiono 00X sen obstaklo, malhelpo, bloko, bato, baro (krom por la trinkaĵoj), miso, malico, malpaco, aresto, turmento, mortigo-provo, torturo kaj dirado de malbelaj nomoj.

foto:
(kun sekreta barbo)

Nomo: Pinta Stel'

Sekreta numero: 005

Adreso: 2 Babunda Voj'

Urbo: Peturbo

Lando: Ŝtata sekreto

Valida ĝis: morgaŭ, stultulo!
(cetre vi malatentos tion!)

foto:
(sen sekreta barbo)

Nomo: Lunjo Gurta

Strato: 5 Tesenca Strat'

Urbo: Kukurbo

Poŝtkodo: 1834

Lando: ne estas ŝtata sekreto

Valida ĝis: hieraŭ, stultulo!
(cetre vi malatentis tion!)

foto:
(kun sekreta vizaĝo)

o: Perko Danot

eta numero: 003

so: 3 Viala Voj'

: Mururbo

Lando: Barlando

Valida ĝis: Ŝtata sekreto

1. Kiu loĝas en Kukurbo?
2. Kiu loĝas en Mururbo?
3. Kiu loĝas en Perturbo?
4. Kiu loĝas en Strato?
5. Kiu loĝas en domo du?
6. Kiu loĝas en domo tri?
7. Kiu loĝas en domo kvin?
8. Kiu havas poŝtkodon?
9. Kiu loĝas en Barlando?
10. Kiu ne havas sekretan numeron?
11. Kiu pasporto validis ĝis hieraŭ?
12. Kiu pastporto validos ĝis morgaŭ?
13. Kiu pasporto validos ĝis nekonata dato?

Al kiu apartenas...

bovino?	podio?
mapo?	forno?
tondilo?	teko?
flago?	sako?
pano?	ŝafo?
tabulo?	ekrano?
porko?	ŝtofo?
skanilo?	muso?
pilko?	pasporto?
jako?	kranio?
kranio?	poŝlampo?
masto?	skarabo?
klavaro?	falsa barbo?